*Redakta noto : Fidela aŭtoro de Scienca Revuo honorigita*

## Intervjuo kun nova (la 11-a!) hungara Honora Membro de UEA, d-ro *Endre DUDICH*

***– Sinjoro profesoro! Ni kore gratulas vin pro tio, ke la 4-an de aŭgusto 2007, komence de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, vi iĝis Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA). Kiel vi reagis al la novaĵo ricevita?***

E.D.: Evidente kun ĝojo kaj dankemo. Ja estas vere honorige esti elektita Honora Membro de UEA post tiaj prestiĝaj personaĵoj kiel la instruisto-poeto *Ferenc JÁKI*, ĉefkuracisto d-ro *Imre FERENCZY*, kaj prof. akademiano *Ottó HASZPRA*. Eĉ pli, se oni memoras pri la jam forpasintaj eminentuloj *Gyula BAGHY*, d-ro *Kálmán KALOCSAY*, *Pál BALKÁNYI*, *Lajos KÖKÉNY*, d-ro *István SZERDAHELYI*, d-ro *István BÁCSKAY* kaj *Károly FAJSZI*. Mi kaptas la okazon publike esprimi mian sinceran dankon al tiuj, kiuj proponis min por tiu distingo, kaj al ĉiuj kiuj subtenis la proponon, en- kaj eksterlande. Fakte tio estas la "krono": la fina rekono de mia ppp-agado (pri, per, por) Esperanto, mia "kariero" de esperantisto.

***– Bonvolu resumi tiun "karieron"!***

E.D.: Volonte. Kun Esperanto mi renkontiĝis jam kiel budapeŝta mezlernejano interesiĝanta pri lingvoj. La majstra Esperanto-traduko de la "Tragedio de l' homo" fare de *Kalocsay* kaptis kaj konvinkis min. Tamen mi iĝis Esperanto-movadano nur 12 jarojn poste, kiam mi laboris kiel geologo en la aluminio-industrio. Instigis min mia kolego-geologo kaj entuziasma Esperanto-amiko, d-ro *Josef KAVKA* en Prago, redaktoro de "Geologio Internacia" de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), la plej severa lingva kontrolanto de miaj tekstoj. Mi ŝtatekzameniĝis krom 8 aliaj lingvoj ankaŭ pri Esperanto, kaj redaktis du volumojn de "Geologio Internacia". Dum la 1970-aj jaroj, reveninte en la ĉefurbon, mi estis vicprezidanto de la budapeŝta Esperanto-Klubo "Konkordo", gvidata de *Ervin FENYVESI*. En 1986 mi ricevis la titolon de Asociita Profesoro (pri Geologio) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En 1987 mi estis ano de la Komisiono de UEA pri Scienca kaj Faka Aplikado, estrata de prof. *O ttó HASZPRA*, kaj samjare mi ricevis Honorinsignon de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) kaj dufoje estis eĉ ties vicprezidanto (1994-1998 kaj 2004-2006). Retiriĝintan de tiu malfacila posteno, la ĝenerala asembleo de HEA unuvoĉe elektis min unu el la Honoraj Prezidantoj de HEA. Kaj nun estas farita la lasta paŝo, en Jokohamo, kie cetere mi ne ĉeestis.



***– Vi rakontis pri viaj sinsekvaj funkcioj kaj postenoj en la Esperanto-movado. Bonege, sed kion vi fakte prilaboris kaj verkis?***

E.D.: Precipe mi tradukis, el 20 lingvoj. Entute pli ol 1700 paĝojn. Sed mi verkis ankaŭ originalajn esperantaĵojn. La plejparto de miaj "produktoj" estas transdonita al la Kolektaĵo *Fajszi* de Landa Fremdlingva Biblioteko (*OIK*). Ĉirkaŭ 40 el miaj skribaĵoj iĝis presitaj. La duono de tio estas sciencaj kaj scienc-popularigaj. Inter ili troviĝas du libroj: "Ĉu vi konas la Teron?" (1983, kun la helpo de geofizikisto *András LUKÁCS*) kaj la scienc-fikcia romaneto "La lumo nutranta" (2003, danke al la tro frue, en 2004 forpasinta ĉefsekretario de HEA, *Oszkár PRINCZ*). Mi prelegis multe pri kaj en Esperanto: en 20 urboj de Hungario, kaj ankaŭ eksterlande (en Brazilo, Francio, Italio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovenio, Sovetunio ktp.). Mi partoprenis en 6 Universalaj Kongresoj (1966 Budapeŝto, 1978 Varno, 1983 Budapeŝto, 1987 Varsovio, 1996 Prago, 2005 Vilno). En 1998 mi organizis en la universitato ELTE de Budapeŝto la Duan Danuban Esperantan Sciencan-Kulturan Forumon (DESKF-2). Pasint-somere mi prelegis en Tavoleto, Italio, ĉe la centjariĝa kunveno de ISAE, je invito de ties prezidanto d-ro *Rüdiger SACHS*. Kaj ĵus antaŭ la jokohama UK, mi prezentis la enkondukan prelegon pri la ĉeftemo "Akvo" de la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en *Maribor*, Slovenio. Fine, estas mia devo mencii ankaŭ, kion mi n e faris: mi neniam instruis la lingvon. Des pli alte mi estimas tiujn, kiuj tion faras. Sen ili Esperanto formortus.

***– Kiujn planojn vi havas nun?***

E.D.: Estante jam 73 jarojn aĝa, mi evitus troigi la aktivadon kaj akcepti novajn taskojn. Sed mi regule, ĉiumonate, vizitadas la kunvenojn de du tre aktivaj budapeŝtaj Esperanto-rondoj: tiu de "Onjo Eva" (sinjorino *Eva FARKAS-TATÁR*) kaj tiu de Ludoviko & Julinjo (d-ro *Lajos MOLNÁR* kiaj lia edzino d-rino *Julianna FARKAS*), la Budapeŝta Medicinista Esperanto-fakgrupo. Mi ankaŭ prelegadas tie. Se mia sano permesas, mi emus partopreni en 2008 la UK en Roterdamo, okaze de la centjariĝo de UEA.

***– Sinjoro profesoro, ni dankas, kaj deziras al vi sanon kaj bonan humoron.***

E.D.: Dankon pro via intereso kaj viaj bondeziroj, kiujn mi elkore reciprokas.

(Fonto: Hungara Fervojista Mondo 3/2007, p. 48)